
# BOLETIN

## DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Nº 252

JULIO-AGOSTO 1982



Gabi Jobba (Rita Osjanina) en «La aŭtoroj ĉi tie estas silentaj». I. Renkontiĝo de Esperanto-Teatro en Budapeŝto.

**BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

DIRECTORA:
Dº Mª Aurora Viloria Nieto

DIRECCION Y ADMINISTRACION
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

REDACTOR JEFE
D. Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40 Telf. (93) 3338081
BARCELONA 28

COMITE DE REDACCION

D. Giordano Moyá
D. V. Hernández Llusera
D. Gabriel Mora y Arana
D. Pedro Nuez

*La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.*

Depósito Legal VA. 616.—1978
Gráf. Andrés Martín, S. A. - Juan Mambrilla, 9 Valladolid

## UTILAJ ADRESOJ

**HISPANA [illegible] RACIO**
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

**Prezidantino**
Mª Rafaela Urueña Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12-2º-C
Télf. (983) 260086
VALLADOLID

**Sekretario**
Luis Hernández García
adreso kiel supre

**Kasistino**
Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde 8-8º-A
VALLADOLID

Pagoj sendu al nia Konto
Nº 001.664-0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana E.
A. Lorenzo Hurtado, 1
VALLADOLID

**LIBRO-SERVO DE H.E.F.**
Jacinto Urueña Antón
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

Pagoj por Libro-servo, sendu al
Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cuenta Nº 042.268-4 a nombre de
LIBRO-SERVO DE H.E.F.
VALLADOLID

**ELDONA FAKO**
Inés Gastón
Pº de la Constitución, 35-4º
ZARAGOZA-1

**INFORMA FAKO**
Ramón Molera
Sta. Joaquina, 13
MOYA (Barcelona)

**ĈEFDELEGITO DE UEA**
Juan Azcuénaga Vierna
Capitán Palacios, 3-4º-N
SANTANDER



En Okajama, kun D-ro Harada, Prezidanto de la Okaĵama E. Societo, kaj F-ino Tutui.

# ESPERANTO VOJAĜAS... TRA JAPANIO

La plej bona metodo por pruvi la efikon, la vivecon kaj la internaciecon de nia Lingvo Internacia estas vojaĝi... internacie. Ankaŭ por konstati kiel la tuta esperantistaro formas certe «unu grandan, rondon familian», estas interese viziti aliajn landojn. Por vere koni kion signifas la «Esperanto-movado» kaj la «interna ideo», oni nepre bezonas vojaĝi kaj kontakti kun gesamideanoj enlandaj aŭ eksterlandaj. Tia estas la nura formo por sperti la grandan ĝojon paroli veran internacian lingvon.

Do, tion ni faris lastsomere, dum Septembro, mia edzino kaj mi. Jam la pasintan jaron, dum la tuta monato Aŭgusto ni vojaĝadis tra Italio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario, Aŭstrio kaj Svislando, kie ni renkontiĝis unuafoje kun geesperantistoj eksterlandaj. En ĉiuj urboj, kiujn ni vizitadis, ni kontaktis ĉarmajn, ĝentilajn gesamideanojn, kiuj volonte gastigis nin kaj akompanadis nin por vizitado kaj oportuna klarigado pri la mirindaj vidindaĵoj. Dank'al ili ĉiuj, mi povis realigi la unuan filmon de intencata longa serio de esperantaj filmoj, sub la ĝenerala titolo «ESPERANTO VOJAĜAS».

Tia unua sperto estis tiel interesa kaj fruktodona, ke ĉijare ni elektis Japanion por ripeti la sperton kaj alporti al tiuj malproksimaj samideanoj la korajn saluton de la hispana esperantistaro kaj, speciale, de la MADRIDA ESPERANTO-LICEO.


KION ni trovis en Japanio? Kia estas mia impreso pri tiu ekzota lando? Certe, Japanio estas ekzota, malproksima lando pri kiu tre ofte oni aŭdas paroli, legas artikolojn en ĵurnaloj kaj ankaŭ kelkafoje per televido montras al ni belegajn dokumentajn filmojn pri ĝiaj novaĵoj aŭ ĝia aktualeco.

Laŭ Jean-Jacques Servan-Schreiber, la franca aŭtoro de la grava libro «La monda defio», Japanio estas unu el la kaŭzoj de la tiel nomata «Teknologia revolucio» kaj samtempe unu el la esperoj por solvi la krizajn problemarojn de la nuntempa mondo.

Kion mi povas sendube aserti, tio estas, ke inter la multaj landoj, kiujn mi jam konas, Japanio estas unu el la plej progresemaj kaj malvolviĝintaj. Kvankam ĝi apartenas al tiu grupo de «orientaj landoj» vulgare konsiderataj kiel «misteraj», sed fakte, nekonataj, la moderna Japanio estas perfekta harmonia simbiozo de la malnovaj tradiciaj kutimoj kun la plej avangardaj kaj progresemaj vivmanieroj de la nuna epoko. Laŭ mia impreso, la hodiaŭa japano sin sentas komforte feliĉa kaj eble fiera kun siaj hereditaj moroj kaj li bone scias akordigi ilin kun la neeviteblaj okcidentaj influoj. Pro tio oni bone povas konstati tra la tuta lando, ke Japanio ankoraŭ konservas sian propran kaj tipan karakteron.

Socie, la vivnivelo estas sufiĉe alta kaj oni ĉiam spertas tre agrablan socian ordon kaj profundan senton de puremo por la stratoj kaj publikaj lokoj. Eble pro la natura ĝentileco kaj konduto de la japanoj, oni ĉie spiras ekvilibran etoson je vigla aktiveco kaj trankvila senurĝeco. Promenante surstrate estas frape videbla simpla kaj bonstila eleganteco inter la homoj kies sekreto nur konsistas el la nepra blankeco de la ĉemizoj kaj la pureco de la vestaĵoj, kiuj tre malofte estas ekstravagancaj aŭ malordaj. Tio-ĉi, kun la delikata beleco de la virinoj faras el simpla promenado agrablan spektaklon.

La Lando mem estas riĉa, ĉiam verda, abunde kovrita je densaj arbaroj, abunde akvumata el larĝaj riveroj, ame respektata kaj zorge profitata ĝis la malgranda kampo por kultivi la rizon, la legomojn aŭ la tipajn, belegajn florĝardenojn sen kiuj la japana vivo ne estus imagebla. La pejzaĝo estas ĉiam mirinda dank'al multnombraj montaroj kiuj ornamas la tutan landon, kaj dank al la maro ĉiam proksima, kun siaj malgrandaj insuletoj, kiuj faras el la Interna Maro unu el la plej belaj pejzaĝoj de la mondo.



**Kun la estraro de la Nagoja Esperanto Societo.**

La vivo en Japanio estas organizita tiel ke ĝi resultas agrabla, komforta kaj sen problemoj. La eksterordinara malvolviĝo de la japana industrio estas efike aplikata al la publika vivsistemado kaj granda parto el la publikaj servoj estas aŭtomatigita. Oni povas diri, ke en Japanio ĉio estas aŭtomata. kaj kio estas pli surpriza, ĉio aŭtomate bone funkcias. Oni pensas pri ĉio, kio povus fari la publikan vivon pli facila kaj agrabla. Ekzemple, cindrujoj kaj paperujoj abundege distribuitaj; flavaj avertoflagetoj por piedirantoj aŭ infanoj, en multaj danĝeraj stratkruciĝoj; muzikaj aŭ birdosonaj signaloj por averti blindulojn ke ili povas trairi la straton; irejoj por handikapuloj, k.t.p. Ĉio estas pripensita por eviti akcidentojn aŭ malfacilaĵojn. La publikaj transportiloj estas oftaj, abundaj, komfortaj kaj sekuraj kaj, ekscepte la horoj de pleja okupeco, ĉiam oni povas trovi komfortan sidlokon.

Estas ankaŭ menciinda la afabla ĝentileco de ĉiu japano por helpi al la eksterlandano trafanta iun problemon aŭ malfacilaĵon. kio ne estas tute malofta pro la signoj de la japana skribo, kiu tute ne ebligas legi la nomojn de la stratoj aŭ lokoj, se ne skribitajn per latinaj literoj.

Mi ne intencas priskribi en tiu ĉi ĝenerala «informo» la multnombrajn mirindajn vidindaĵojn, kiujn ni vizitadis dum nia vojaĝo kaj mi kaptadis en mia filmo: Temploj, sanktejoj, monumentoj, palacoj, kasteloj, ĝardenoj, k.t.p. Certe Japanio enhavas nekalkuleblan trezoron de tradiciaj, historiaj, kulturaj kaj artaj mirindaĵoj pri kiuj jam multaj libroj estas skribitaj. Pro tio nur interesas min konkretigi mian «informon» precipe pri la homaj kaj Esperantaj aspektoj, akorde kun la impresoj, kiujn ni

spertis dum nia vojaĝo tra la urboj Tokyo, Nagoya, Uzi, Kyoto, Kameoka, Osaka, Okayama kaj Hiroshima.

Oni diras, ke la japanoj estas fermita popolo, ne ŝatanta montri al eksterlandano la intimecon de sia domo kaj privata vivo; oni diras, al ilia «tro ĝentila ekstero, mankas sincero» ke ili estas iomete unuformaj, kvazaŭ robotigitaj pro la laboro, ke ili ne kapablas krei aŭ inventi, sed nur imiti kaj simile.

Koncerne al la supozita «fermiteco», mi ne povas diri, ke ĝi estas certa, almenaŭ ĉe la multaj geesperantistoj kun kiuj ni kontaktis. Kontraŭe, multaj el ili malfermis al ni siajn domojn bonvole kaj sincere, kelkaj tute volonte gastigis nin en siaj hejmoj kaj ĉiu akceptis, traktis kaj kelkafoje eĉ regalis nin tute bonkore kaj senrezerve. Ni, do, povis bone partopreni en la normala vivo ĉiutaga de la normala japano , kiu pli-malpli, estas tute simila al la kutima vivo de iu ajn normala civitano, se oni ekskludas la tipan japanan manieron sidi kaj kuŝi sur la planko kaj la ankaŭ pli tipan manĝarton kaj kuirarton.

Mi tute ne kredas, ke la «ĝentila ekstero« kun kiu ni estis akceptitaj en la japanaj domoj estis «manko de sincero». Tute kontraŭe, ni sentis nin profunde kortuŝitaj kun la varmaj sinklinoj el la dommastrino, kiam, ili akceptis nin en sia hejmo kaj oni povis sendube legi la sincerecon en iliaj okuloj kaj esprimoj. Mi ne povas ne mencii ĉi tie la varman akceptadon kiun ni ricevis de ĉiuj Esperantistoj, grupoj de la urboj, kiuj ni vizitadis, nek la akuratan kaj efikan formon laŭ kiu ili zorge organizis nian restadon kaj vizitojn. Ni devas ankaŭ konfesi, ke la japana esperantistaro «perfekte funkcias» kaj estas ĝuste tiu ĉi profunda sento de internacia amikeco, de homa frateco, de vera esperantista solidareco, kiu faris al ni senti la veran ĝojon partopreni en tio kion mi konsideras la vera esenco de la «interna ideo».

Kvankam ili jam komencas senti la malbonan influon de la tiel nomata «okcidenta/koka-kola kulturo» kaŭzanta la disigon de la familio, ŝajnas al ni, ke la japana familio ankoraŭ estas solida, unueca en la socia vivo kaj, ke la junularo restas iom pli kuna al la familia kerno. Por ni estis vere notinda la eksterordinara zorgado de la infanoj fare de la gepatroj kaj, ĝenerale, la zorgema atento, kiun la japana administracio dediĉas al la infanoj kaj junuloj. Mi ne povas certigi, ĉu ĝi estas mia persona impreso, aŭ ĉu reala fakto, ke la plej granda parto de la nuna japana loĝantaro estas junuloj, sed mi povas sendube aserti, ke ni estis vere surprizitaj de la eksterordinara granda nombro de gejunuloj, kiujn ni ĉie kaj ĉiam trovis en Japanio. Eble estas ĉi tio, kio donas al la stratoj tiel simpatian kaj dinamikan aspekton. Tamen estas inter la junularo kie la tiel nomata «Koka-kola kulturo» efektivigas sian kelkaspektan misinfluon.

Estas certe, ke en Japanio oni multe ŝatas uniformojn kaj estas tiu ŝato kiu donas al la popolo tiun uniforman aspekton, kiam la grandega amaso de laboristoj kaj lernantoj eniras en aŭ eliras el la laborejon aŭ lernejon, estas certe notindaj la multnombraj personoj en uniformo aŭ preskaŭ same vestitaj, el kiuj estas tute plenaj la stratoj kaj publikaj transportiloj.

Ĉu tiu ĉi uniformema trajto de la japana karaktero povas aŭ ne havi plej profundan signifon en la ĝenerala nacia psikologio, tion mi ne povas scii. Eble ĝi respondas al la

tradicio konservema inklino de la japanoj, ankaŭ bone videbla, ekzemple, en la klasika japana domstilo larĝe konservata kaj, krom malgrandaj diferencoj, ĉiam la sama. Sed por mi, ĝuste tiu «konservema inklino» estas kio asimiligas ekvilibre la okcidentajn influojn, tiel ke ĝi ne rompas abrupte la tradician harmonion de la pramoroj. Pro tio, estas speciale agrabla vidi surstrate, kune kun la okcidentaj vestaĵoj, multajn virinojn vestitajn per la eleganta, bela kaj tradicia kimono kaj, rilate al la domoj eĉ la plej moderne ekipitaj, ĉiam havas specialan ĉambron. aranĝita laŭ la plej tradicia japana maniero.

Koncerne al la ĝenerala opinio pri la manko de inventemo aŭ kreemo de la japanoj, mi ne povus aserti ĉu ĝi estas certa aŭ necerta, tamen, mi devas konfesi ke ni estis ĉiam surprizitaj de la multnombraj pruvoj de inteligentaj inventaĵoj aplikitaj al la ĉiutaga vivo aŭ al la industria produktado por ke ĝi rezultu pli agrabla, komforta kaj produktema. La fama trajno nomata «Shinkansen» kiu estas la plej rapida en la mondo, la pluraj teknologiaj malvolvoj sur la kampo de la elektroniko, la fotografio, la informatiko, la mikroprocesiloj, k.t.p.; la sennombra varieco je ludiloj kaj ludmaŝinoj, eĉ la nediskutebla japana kapablo por ĉion malgrandiĝi, ŝajnas al ni ke estas bona pruvo de kreipova inventemo.

Pri la Esperanta Movado en Japanio, mi povas aserti ke ĝi estas ege aktiva kaj bone organizata. Ni kontaktis kun la lokaj grupoj de ĉiuj urboj, kiunj ni vizitadis, kaj kunvenis kun la anoj por interparoli aŭ prelegi pri kelkaj filmoj pri Hispanio, kiujn mi prezentadis por sciigi al ili iom el nia Lando. Kvankam en kelkaj urboj, la grupanoj ne estis tre multnombraj, ili ja estis sufiĉe parto-prenemaj kaj kunlaboremaj. Ni ĉiam perfekte interkompreniĝis kaj la lingvonivelo de multaj anoj estis tre bona; ĉi tie, mi devas speciale mencii la ege entuziasman agadon de la junaj grupoj «Rondo Harmonio», organizitaj en la plej gravaj urboj de Japanio, kie ili laboras en la Universitato por la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj de la pacamo. Ni estis forte impresitaj de la bone organizita laboro de tiuj ĉi junuloj, kiuj tiel perfekte interpretas la veran signifon de la «Esperanta Movado» kaj ni pensas, ke ĝi devus esti larĝe imitata de la tuta esperantistaro. Ankaŭ estas menciinda la efika laboro de la religia organizo Oomoto en sia Kameoka centro celante la Zamenhofan postulon «unu mondo, unu dio, unu lingvo». Ili pene disvastigas la internacian lingvon kaj uzas ĝin por siaj internaciaj rilatoj. Kiam ni vizitis la Oomoto-Centron de Kameoka, ĝentile invitite de ĝia estraro, ni estis kore impresitaj de la kunfrateca spirito kaj bone organizita programo pri la instruado kaj divastigado de Esperanto. Same, la diversaj Esperanto-Societoj kaj grupoj apartenantaj al la Japana Esperanto-Instituto efike propagandas nian lingvon pere de prelegoj, ekspozicioj, eldonado de libroj, k.t.p.

Kaj nun, antaŭ ol fini tiun ĉi koncizan raporton pri nia neforgesebla vojaĝo tra Japanio, mi sentas la devon, publike kaj tutkore danki al la japana esperantistaro de tiuj urboj, kiujn ni vizitadis, pro la zorgemaj atentoj, la afablaj, sindonemaj gastigadoj kaj la amikeca akompanado kaj gvidado. Dank'al ili mia dua filmo esperanto en la serio «ESPERANTO VOJAĜAS», povis estis realigita.

**José F. Arroyo**

# BOMBA VOJAĜO!

Stjepan Filipović, kiu apartenis al tiu speco de migrantaj homoj konataj kiel gastlaboristoj, neniam sentis sin tute ĉehejme kun siaj gastigantoj en Svedio eĉ post dujara restado. Ĉar li ne povis enkapigi sufiĉan kvanton da utilaj vortoj kaj frazoj de la nacia lingvo, li ĉiam troviĝis en malavantaĝa pozicio rilate al labordonantoj, kiuj senkompate ekspluatis lin ĝis elĉerpiĝo. Anstataŭ supreniri la eskalon de sukceso de aĉe malaltaj laboroj al sinsekve pli profitdonaj oficoj, li daŭre refalis tiel, ke finfine li povis dungiĝi por nur tiuj okupoj, kiujn neniu alia laboristo, ĉu gasta, ĉu enlanda, emis entrepreni.

Post kiam Filipovic atingis la nadiron —figure kaj reale—, laborante kiel kloakpurigisto sub la stratoj de Stokholmo, li firme decidis fari drastan penadon por plibonigi sian situacion. Sed liaj ĉiamaj fiaskoj baldaŭ indikis al li, ke restas nur unu ankoraŭ neplugita tereno, kie li havos eblon elstari: la krimo. Li ja ne pensis pri tiaj sensaciaj faroj, kiaj meritas raportaĵojn sur la frontpaĝoj de ĵurnaloj, ekzemple pristelado de bankoj aŭ forkapto de riĉaj industriuloj. Male, li intencis dediĉi sin al relative modestaj deliktoj kiel domŝtelado kaj priŝtelado de vendejoj, kiuj certigos al li la akiron de bazaj vivrimedoj.

Pro iu latenta, eble denaska, trajto, kiu subite manifestiĝis, Filipovic faris eminente kontentigan rekordon dum la unuaj semajnoj de okupiĝo pri sia nova metio kaj li daŭre serĉis novajn metodojn por evoluigi sian talenton. Tiucele li pasigis siajn ripozhorojn en kinejoj, atente observante ĉiujn detalojn de krimfilmoj el la tuta mondo. Tiu tempo ne estis malbone uzata; Filipovic profunde edukiĝis kaj lernis poluri sian stilon. Ofte li apenaŭ povis atendi la finon de filmo, tiel avida li estis por fari praktikan provon de tekniko prezentite en la surekrana demonstrad-leciono.

Iam, dum li spektis italan filmon, kiu vere estis komedio kun iom da krimeca fono, kaptis lian atenton ruza metodo uzata de ŝtelisto, kiu estis sur la sama nivelo kiel Filipovic mem, liberigi naivajn vojaĝantojn de ilia pakaĵo. Dum la nesuspektanta homo aĉetis bileton, legis gazeton aŭ dormetis, la ŝtelisto alproksimiĝis al la predo kun sia propra valizo enmane. Certigante, ke la atento de la pristeloto estas deturnita, la krimulo rapide kovris ties mankofron per sia valizo kaj, kunportante ambaŭ, pafis sin for de la lokalo. En la filmo estis klare montrite, kiel funkciis la «krimilo» de la ŝtelisto. Lia valizo aspektis tute ordinare, sed pli proksima ekzameno malkovris, ke la flanko kutime restanta surplanke estis forprenebla, kaj kontraŭflanke apud la tenilo estis truo, tra kiu oni povis meti la manon sur la tenilon de la ŝtelota pakaĵo. Tiel estis eble forporti alies man-kofron tute kaŝitan interne de la valizo de la ŝtelisto.

Tiu artifiko tiel impresis Filipovic, ke, reveninte en sian ĉambron, li ne povis ekdormi ĝis, per helpo de poŝtranĉilo, li alfaris sian plej grandan valizon por la nova celo. Post dekminuta praktikado li konvinkiĝis pri la perfekteco de tiu ŝtelmetodo.

«Ĝi ne povas fiaski. Kial mi ne ekprovu ĝin tuj?» li demandis sin.

Ĉar Filipovic loĝis en la sama kvartalo, kie situis la stacidomo, li senhezite

rapidis tien kun sia malplena valizo. Li eĉ ne devis eniri la halon. Ekstere serpentumis viclinio da alvenintaj vojaĝantoj atendantaj taksiojn. Ankaŭ Filipovic enviciĝis inter ili, elektante lokon malantaŭ maljunulo, kies du valizoj staris po unu ĉe ĉiu flanko. Laŭ la takso de Filipovic, la pli ganda facile eniros en sian valizon. Kiam aŭtokorno sonis, kaj la viro turnis sian kapon al la trafikplena strato, Filipovic lerte plenumis sian taskon. Kiam la oldulo denove etendis sian manon por preni la maldekstran valizon, li kaptis nur aeron. Filipovic jam estis survoje hejmen kun sia unua rabaĵo.

La sekvan tagon, ŝanĝante sian sferon de agado, Filipovic direktis siain paŝojn al la aŭtobus-stacio kaj post zorga ĉirkaŭrigardado decidis ekposedi valizeton de tre ŝike vestita virino, dum ŝi gaje kaj longe babilis en telefonbudo. Li ne miskalkulis kaj rikoltis riĉan trezoron, konsistantan el juveloj kaj ankaŭ vojaĝĉekoj.

La trian tagon, la aventurema Filipovic volis provi ankoraŭ novan ĉirkaŭmedion, do li veturis per aŭtobuso al la flughaveno Arlanda. Ankaŭ alia malbonfarulo sidis en la sama veturilo: iu Abdul-Rahman, membro de internacia bando de teroristoj, kiu estis komisiita rendevui kun siaj komplicoj por fari atencon kontraŭ germana jeto, ekflugonta tiun vesperon. Sur liaj genuoj estis nigra kofreto, kiun li insiste rifuzis deponi en la pakaĵ-fakon de la aŭtobuso, malgraŭ la peto de la ŝoforo. Tiu ujo enhavis la armilojn de la bando kaj ankaŭ diversspecajn eksplodemajn substancojn.

Observante, ke lia kunvojaĝanto tute ne volis demeti sian pakaĵon, Filipovic konjektis, ke io grava aŭ valora devas esti en ĝi, do li decidis, ke tiu kofreto fariĝos lia hodiaŭa predakiraĵo. Kiam la pasaĝeroj elaŭtobusiĝis ĉe la flughaveno, Filipovic sekvis la portanton de la kofreto al la atendejo.

Abdul-Rahman, rigardinte unue al sia brakhorloĝo kaj poste al la granda murhorloĝo por kontroli la horon, sidiĝis en fotelo kaj ekbruligis cigaredon. Li daŭre tenis unu manon sur la tenilo de la nigra kofreto, starigita ĉe unu flanko de la fotelo. Filipovic apogis sin al muro apenaŭ dek pasojn vidalvide al la kofreto kaj pacience atendis la oportunan momenton por ekagi.

La teroristo, evidente suferante pro nerva streĉiteco, fumis unu cigaredon post alia, kaj tiel rapide elĉerpiĝis la enhavo de sia paketo. Li ekstaris kaj iris al apuda budo por provizi sin per pli da cigaredoj. Jen la okazo, kiun Filipovic atendis. Fulmorapide li promenis al la pormomente vaka fotelo, glitmove metis sian valizon sur la kofreton kaj aplombe daŭrigis sian vojon al la elirejo.

Sed nun postene staris ĉe la pordoj aro da policanoj, rigardante la en- kaj elirantajn homojn. Iu kvazaŭ instinkta sento aludis al Filipovic, ke ĝuste nun ne estas la plej bona tempo por eskapi kun la ŝtelitaĵo. Cetere, li surpriziĝis pro la pezo de la nigra kofreto. Kutime pakaĵo de aviadilaj pasaĝeroj estas relative malpeza —dudek kilogramoj estas la pezlimo—, sed tiu kofraĉo sendube pezis duoble dudek. Li scivolis pri la enhavo. «Kion metis en ĝin tiu ulo? Ĉu librojn? Ĉu ŝtonojn?» Por ŝpari al si la penon treni senutilan fatrason reen al Stokholmo, venis al Filipovic en la kapon la ideo malfermi la kofreton kaj forpreni ties balaston. Sed kie li faru tion neobservite? La sola loko estis la necesejo.

Neniu estis tie kiam li eniris. Li malkovris la kofreton kaj rimarkis kun malgaja esprimo survizaĝe, ke du grandaj pendseruroj tenis ĝin ŝlosita. Krome, la fortika konstruo de tiu ujo, farita el ŝtal-lado, malpermesis al li alimaniere malfermi ĝin. Li bezonis la ilaron, kiun li kutime uzas por ŝtele malfermi

pordojn kaj fenestrojn, kaj li sakris plenvoce, ĉar eĉ martelon li ne kunportis.

Dume, Abdul-Rahman revenis al sia fotelo kun la manoj plenaj de sufiĉe da cigared-paketoj por dudekkvar-hora atendado. La paketoj kaj ankaŭ la cigaredo en lia buŝo falis surplanken, kiam li gape rigardis al la loko, kie li lasis la kofreton. Eĉ ombro de ĝi ne estis videbla. Gutoj da ŝvito formiĝis sur lia sulkiĝanta frunto, sed antaŭ ol li havis tempon forviŝi ilin, alvenis liaj sambandanoj.

«Nu, ĉu ĉio estas en ordo?» demandis la estro. «Kie estas la kofreto?».

«B-ba-ba... B-bl-bl... B-br-br...» Abdul-Rahman kapablis nur sensence balbuti.

«Stulĉjo! Parolu!» muĝis malalta dikulo. «Kio estas al vi?».

«Enmanigu al mi la armilojn kaj bombojn», urĝe petis la tria bandano, magra viro kun aknomarkita vizaĝo.

«Jes, rapidu!» diris la bandestro. «Nia aviadilo ekflugos post duonhoro».

Kiam Abdul-Rahman klarigis, kio okazis, ankaŭ la vizaĝoj de la aliaj teroristoj baniĝis en ŝvito.

«Kion fari?» demandis la dika bandano.

«Ni foriru tuj!» ordonis la estro. «Nun estas tro danĝere resti tie ĉi. Ne plaĉas al mi la subita apero de tiom da policanoj».

La triopo rapide eliris en la direkto al la taksihaltejo.

Ankoraŭ en la necesejo, Filipovic rompadis al si la kapon por trovi manieron malfermi la kofreton. Finfine, brila ideo fulmis tra lia cerbo. Se li povus ĵeti la kofreton tra la fenestro, la ekfrapo sur la betona pavimo malsupre certe sufiĉus por rompi la ĉarnirojn, kaj tiel li povus enrigardi kaj forpreni nur la plej valorajn aĵojn. Malferminte la fenestreton, li levis la kofreton per granda fortostreĉo sur la fenestrobreton kaj puŝis ĝin eksteren.

Post du-tri sekundoj aŭdiĝis orelfenda «bum!» kaj frakasiĝis ĉiuj fenestro-glacoj sur tiu flanko de la flughavena konstruaĵo. La polico, kiu estis antaŭpreparita por tia okazaĵo, tuj ĉirkaŭis la tutan flughavenon.

Ruliĝante en taksio survoje al Stokholmo, ankaŭ la kvar fuŝintaj teroristoj aŭdis la detonacion kaj, frapite de konsterniĝo, ili rigardis unu al la aliaj.

Kiam esplorantaj policanoj atingis la necesejon, ili trovis sternita sur la planko la duonkonscian korpon de Filipovic. La neatendita eksplodo tiel ŝokis lin, ke li svenis. Apude kuŝis lia malplena valizo. Ekzamenınte ĝin, la policanoj komencis tiri supraje evidentajn konkludojn, precipe, ĉar la eksplodo okazis ĝuste sub la malfermita neceseja fenestreto.

Kiam Filipovic rekonsciiĝis, polic-oficiro informis lin pri la situacio, en kiun li trafis.

«Ni ricevis averton, ke teroristoj intencos ataki aviadilon hodiaŭ vespere. Ŝajnas, ke via bombo iom antaŭtempe eksplodis. Bonŝance! Ni arestas vin pro kontraŭleĝa posedo de armiloj kaj eksplodaĵoj».

Kiam la taksio, en kiu sidis la kvar membroj de la bando atingis Stokholmon, ili aŭdis per la veturila radioricevilo la voĉon de paroladisto, kiu interrompis muzikan programon por anonci, ke en la flughaveno Arlanda estis arestita ĉi-vespere membro de bando de eksterlandaj teroristoj, kiuj planis eksplodigi germanan aviadilon. La mienoj de la kvaropo en la taksio montris eĉ pli da konfuzo ol antaŭe.

**Bernard Golden**

# NIAJ GRUPOJ

**LA LAGUNA (Tenerife).**—La tagon 16-an de februaro, la esperanta Asocio E.S. T.O., festis la 25 jaran dat-revenon de ĝia fondiĝo. La ĵurnalo «El Día» publikigis duonpaĝan artikolon verkita de S-ro Rodríguez Peña.

**BILBAO.**—En la Ĝenerala Kunveno okazis renovigon de la estraro, kiu konsistas *nun el:*

Prezidanto: Tomás Apráiz.
Vicprezidanto: Igone Manciles.
Sekretario: José Angel Trueba.
Vicsekretario: Mari Carmen Juanes.
Kasisto: Jesús Miguel García Iturrioz.
Vickasisto: Angel Santos López.
Voĉdonanto: Santiago Martín.
Voĉdonanto: Francisco Javier García.
Voĉdonanto: Dolores Fernández.
Voĉdonanto: Andoni Hierro.
Voĉdonanto: Arantza Manciles.

La 15-a de junio je la 7,30 vespere okazis la fermo de la kurso, kaj disdonado de steloj al la gelernantoj, donaco de libroj al la geprofesoroj k.t.p.

**VALLADOLID.**—Kiel kutime, ni daŭrigis la esperantlingvajn prelegojn la lastaj mardoj ĉiumonate. Laste prelegis S-ro Angel Díez, Vicprezidanto de H.E.F., pri traduka teksto; S-ino M. *Rafaela Urueña pri «La konflikto en la Malvina-insularo, laŭ la* Internacia Juro», kaj fine S-ro Dativo Blanco pri «La IFEF Kongreso en Balatonfüred». Ĉi lasta prelego estis akompanata de la projekcio de belegaj lumbildoj.

La 27-an de junio, kaj laŭ invito de la estraro de H.E.F., S-ro José Fernández Arroyo prezentis al la ĉeestantaro, sian unuan filmon de la serio «Esperanto Vojaĝas», kiu montras la belecojn de Venezio, Budapeŝto, Krakovio, kaj Prago.

**BARCELONA.**—La 21-an de junio, je la 19,45, aranĝita de Barcelona Esperanto-Centro kaj Llibrería Esperanto, estis prezentata la libro en esperanto «SFEROJ», sciencfikciaj rakontoj tradukitaj de Miguel G. Adúriz.

**VALENCIA.**—*Laŭ informoj aperintaj en nº 2 de la* bulteno de la Valencia Grupo, titolita «Valencia Luno», la 6-an de junio okazis en Castellón la 10-a Renkontiĝo de la Valencia esperantistaro. Matene, je la 11-a ĉe la socia centro de la Ministerio pri Kulturo oni *inaŭguris ekspozicion pri fotografaĵoj el la nacia kongreso de H.E.F. okazinta* en ĉi tiu urbo la jaron 1958-a. Je la 12-a, kaj kun la salono plenplena da gesamideanoj, okazis la ĉefa ero de la programo. Post la elkoraj bonvenaj vortoj de S-ro Hernández Aguilella, nome de la esperantistoj el Castellón, salutis la reprezentantoj de la diversaj grupoj. Sekve, S-ro Paskal Pont, de Valencia, prelegis esperante pri «Kvar vojaĝoj ĉirkaŭ la tero». Pli ol cent personoj partoprenis en komuna tagmanĝo okazinta en Benicasim. Laŭ propono de la reprezentanto en Elda, la venontjara renkontiĝo okazos la dua dimanĉon post Pasko en tiu urbeto.

**GIJON.**—De la 12-a ĝis la 26-a de junio, kaj okaze de la Tutmonda Futbalĉampioneco, oni prezentis sub la nomo «Asturias 82» plurajn aspektojn de la kulturo, vivo, *industrio k.t.p. de Asturio. Unu el la standoj, afable pruntedonita de la Direkcio de la* Foiro al la Astura Esperanto-Asocio, montris al la multnombraj vizitantoj, afiŝojn pri Naciaj kaj Internaciaj Kongresoj, bildkartojn, filatelaĵojn, kaj librojn de la plej diversaj genroj kaj stiloj.

# HISPANA LIRIKO

**San Juan de la Cruz** /1542-1591/ rangas kiel unua poeto en la kampo de la hispana mistikismo ĉiutempa. Liaj poemoj, admirinde komponitaj per plej simplaj vortoj, sed plenaj de muziko kaj ritmo, profunde spegulas la misteran mondon de ekstazoj kaj vizioj, kie rifuĝas la metafizika esenco de la religioj.

Jen unu el liaj karakterizaj poemoj, kies lastaj sep triopoj aludas la katolikajn Trinitaton kaj Eŭkaristion.

## Animo-kanto esprimanta la ĝojon koni Dion per la fido

Mi bone scias pri la fonto ŝpruca,
kvankam tenebras!

El ĝi, eterna akvo kaŝe fluas;
mi scias tamen, kie ĝi situas,
kvankam tenebras.

En ĉi obskura nokto de ĉi mondo
laŭfide scias mi pri l'frida fonto,
kvankam tenebras.

Mi scias, ke komencon ĝi ne tenas,
sed ĉiu origino de ĝi venas,
kvankam tenebras.

Egalas ja neni' al tia belo,
el ĝi trinkadas tero kaj ĉielo,
kvankam tenebras.

Mi scias, oni vadi ĝin ne povas,
neniel ĝian fundon oni trovas,
kvankam tenebras.

Konstantas ĝia brilo hel-radia;
el ĝi, mi scias, ondas lumo ĉia,
kvankam tenebras.

La fluoj ĝiaj vaste sin alpuŝas,
ĉielon, homojn kaj inferon tuŝas,
kvankam tenebras.



El tiu font', la fluo ir-komenca
pruviĝas plej kapabla kaj potenca,
kvankam tenebras.

El ĉi du fluoj, jen la fluo nuna,
kun ambaŭ tamen plene ne komuna,
kvankam tenebras.

Mi scias: tri en unu akvo vivas,
kaj unu el alia sin derivas,
kvankam tenebras.

Ĉi font' eterna kaŝe sin proponas
en tiu viva pan', kaj vivon donas,
kvankam tenebras.

Ĉi-loken oni vokas por konsumo
de l'akvo, eĉ en mezo de mallumo
ĉar ja tenebras.

Ĉi vivan fonton, kiun mi avidas,
en tiu vivo-pano mi ekvidas,
kvankam tenebras

**El la hispana:**
**F. de Diego**

# ANĜELUSO

Estis ili dek tri viroj, dek tri bravuloj harditaj en la danĝero kaj alkutimiĝintaj kontraŭbatali la maron. La edzino de la boatestro akompanis ilin.

Tiuj dek tri marbordaj viroj havis la karakterizajn trajtojn de la baska raso: larĝa kapo, agleca profilo kaj pupilo morta pro la daŭra kontemplado de la maro, la granda virvoranto.

La Kantabra Maro konis ilin; ili konis la ondojn kaj la venton.

La sejnboato, longa, streta, nigre farbita, nomiĝis **Arantza**, kio en la baska lingvo signifas fiŝosto. Ĝi havis mallongan maston, plantitan ĉe la pruo, kun pita velo...

Estis aŭtuna vespero, feblis la vento, rondis la ondoj, lant-movaj, trankvilaj. La velo apenaŭ streĉiĝis de la brizo, kaj la sejnboato glitis milde, postlansante arĝentan sulkon en la verdeca maro.

Eliris ili de **Motrico** kaj marŝis fiŝi, kun pretaj retoj, kaj renkontiĝi kun aliaj boatoj en la tago de Sankta Katerina. Tiumomente ili preterpasis antaŭ **Deva**.

La ĉielo plenis de nuboj kotonecaj kaj plumbaj, tra kies fendoj palis pecoj da bluo. La suno ŝprucis en brilantaj radioj tra l'aperturo de nubo, kiu ruĝigita faŭko treme reflektiĝis en la maro.


La dek tri viroj, seriozaj kaj indiferentaj, parolis malmulte; la virino, olda, trikis strumpojn per dikaj trikiloj kaj fadenbulo el blua lano. La boatestro, gravmiena kaj trista, kun la ĉapo ĝisokule surmetita kaj la dekstra mano ĉe remilo aganta kiel direktilo, rigardis la maron indiferente. Ankaŭ malpura pudelo, kiu sidis sur benko ĉe pobo, apud la boatestro, rigardis la maron, tiel seninterese kiel la viroj.

La suno subiradis... Super ili: flamaj ruĝoj, ruĝoj kupraj, cindrecaj koloroj, plumbaj nuboj, enormaj balenoj; sube: la verda haŭto de la maro, kun tonoj ruĝecaj, skarlataj kaj violaj. De tempo al tempo la ritma skuado de la ondoj...

La sejnboato troviĝis fronte al **Iciar**. La vento venis de la tero, plena de odoroj je monto; la bordo desegniĝis kun ĉiuj siaj krutaĵoj kaj rokoj.

Subite, en la agonio de la vespero, sonis la horo en la horloĝo de la preĝejo de **Iciar**, kaj poste la sonorilbatoj de la anĝeluso atendiĝis tra la maro kiel voĉoj lantaj, majestaj kaj sublimaj.

La boatestro demetis sian ĉapon kaj la ceteraj faris same. La virino forlasis sian laboron, kaj ĉiuj preĝis,



gravmienaj, sombraj, rigardante la trankvilan maron kun rondaj ondoj.

Kiam noktiĝis la vento blovis jam forte, la velo ŝveliĝis pro la ventopuŝoj, kaj la sejnboato sinkis en la mallumo, postlasante arĝentan sulkon sur la nigreska surfaco de la akvo...

Estis ili dek tri viroj, dek tri bravuloj harditaj en la danĝero kaj alkutimiĝintaj kontraŭbatali la maron.

Aŭtoro: **Pio Baroja**
Tradukisto: **Liven Dek**

Glosoj: Pita= malgranda
Basko= ano de ĉefgento loĝanta en baskio (erare en PIV: vasko).



**Radioparolisto intervjuante pri esperanto.**

# 6-a HEJS-TENDARO

## LOGROÑO 1982

De la 9-a ĝis la 12-a de aprilo okazis en Logroño la 6-a HEJS TENDARO. Ĉeestis preskaŭ 90 gejunuloj el diversaj regionoj el Hispanio, kaj ankaŭ kelkaj eksterlandanoj.

La tendaro de Logroño estis juna kaj ripetinda. Ĝi estis juna, ĉar ĉiu oficiala decido estis diskutata inter geuloj kies aĝoj ne superis 25 jarojn kaj estis ripetinda, ĉar de la komenco evidentiĝis etoso plena de iluzio, kunlaboremo kaj matureco inter la partoprenantoj.

La vetero, suna kaj varmeta, invitis al simpatia amuzo kaj kamparaj ekskursoj. La ĉeestintoj, kun kontentiga lingva nivelo, praktikis siajn esperantajn konojn, kaj havis eblecon ĉeesti Elementan Kurson kiun gvidis Aŭgusto Casquero; Praktikan kurson pri la instruado de Esperanto laŭ la rekta metodo, gvidis Dennis Keef, usona fakulo pri la rekta metodo.

Dufoje oni montris lumbildojn, unu pri belaĵoj en la mondo, kaj alia pri laborbrigado en Hungario.

Okazis du debatoj, kiu temis pri propagando kaj varbigado de novaj membroj al nia movado, kaj alia pri la spertoj de kelkaj gejunuloj en laborbrigado eksterlande.

Tamen... ne ĉio estis «serioza» kaj vespere, ni vizitis la famajn trinkejojn de la urbo («la vojo de la elefantoj») kie la urbanoj povis konstati ke esperantistoj estas tre bonaj kantemuloj. Ĝi estis la plej ŝatata aktivaĵo.

Inter la ĉeestantoj, oni aranĝis du grupojn por ekskursi. Kelkaj vizitis **San Millán de la Cogolla**, fama Monaĥejo kie aperis la unuaj tekstoj en kastilia lingvo, kaj aliaj iris al **Nájera**, antikva urbo, kortego de la Navaraj Reĝoj.

Tamen, la plej grava evento estis la diskutado pri la nuna situacio de HEJS. Analizinte ĝin, ni konstatis ke, malgraŭ la bonvolemo de la estraro, ĝiaj rezultoj ne estas tiel kontentigaj kiel estus esperebla, do, oni decidis ŝanĝi ĝin. Jen la nova estraro:

Prezidanto: Miguel A. Sancho (Madrid).
Vicprezidanto kaj vocdonanto pri delegitaj aferoj: Ana Mª Ranero (Logroño).
Sekretario: Natividad Millán (Madrid).
Kasisto: Jorge Bueno (Madrid).
HEJS-Reprezentanto en TEJO: Carlos Moya (Valencia).
Redaktoro de HEJS-Juneco: Francisco J. Moleón (Madrid).

Oni elektis ankaŭ specialan delegiton por rilatoj kun HEF: José A. del Barrio (Valladolid).

Rilate al la propagando, ĉio rezultis perfekte. Du programoj en radio, unu por la regiona televido kaj nombraj artikoloj en ĵurnaloj resumas tiun sukcesan aspekton de la organizo. (Je tio ni aldonu, ke la Grupo de Valencia faris ekspozicion de esperantaĵoj en la centra placo de la urbo).

Koncerne al la agado de la loka grupo, estas devige rimarki la grandan laboron plenumita de Ana María Ranero, kiu entuziasme prizorgis ĉiun programeron kaj fariĝis la ĉiesa helpantino.

Restas al mi elstarigi du lastajn aspektojn: la unua temas pri tio ke la gejunuloj interŝanĝis vivantajn spertojn el la esperanta movado (laborbrigadojn, vojaĝojn, pasporta-servon, tutmondajn kongresojn, k.t.p.)

Fine, ni decidis ke la venonta Tendaro okazos en la Esperanto-Oazo de Gandía. Do, ĝis la venonta Pasko en Gandía!

**Ana María Ranero kaj**
**Juan Carlos Ruiz**

# Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj

## Budapeŝto, 1982. 3.19-3.28

La Esperanta Kulturo havis gravan feston inter la 19-a kaj 28-a de marto 1982 en Budapeŝto: enkadre de Budapeŝta Printempa Festivalo okazis **Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj** kun entute dek du teatraj prezentadoj fare de aktoroj el kvar landoj: Francio, Hungario, Pollando kaj Sovetio. Pri la **Renkontiĝo** aperis faldfolio prezentanta la kontribuantajn trupojn kaj la prezentatajn teatraĵojn, kaj aperis pri la historio de Esperanto-teatro informoj en ĉiuj oficialaj eldonaĵoj [tiuj aperis amase en pluraj lingvoj] de Budapeŝta Printempa Festivalo. Tiun ĉi **Renkontiĝon** fakte iniciatis kaj financis Hungarlanda Turisma Oficejo, konforme a la rekomendoj, kiujn akceptis la Monda Konferenco de Turismo, okazinta antaŭ tri jaroj en Manilo.

# IOM PRI ILEF

## INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ FOTO-KINO-MAGNETOFON-AMATOROJ (ILEF)

La Esperanto-movado jam delonge strebas penetri en ĉiujn sferojn de la nuntempa vivo: sciecon, kulturon, teknikon, turismon, ktp. En sia agado la esperantistaro uzas adekvatajn rimedojn, atingante tiamaniere evidentajn rezultojn.

Havante antaŭvide la praktikon kaj la sperton de diversaj fakaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj al UEA organizaĵoj, antaŭ dudek jaroj esperantistoj el diversaj landoj, okupiĝantaj pri foto, kino kaj magnetofon-amatoreco kaj subtenantaj inter si kontaktojn, interkonsentis klopodi pri starigo de oficiala faka organizaĵo. Post longa kaj vigla preparlaboro tiu ideo realiĝis en 1963 dum la Universala E-kongreso en Sofio, Bulgario. En la fonda kunveno estis akceptita la Statuto de la organizaĵo kaj la Estraro de la novefondita INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ FOTO-KINO-MAGNETOFON-AMATOROJ (ILEF).

Kiel faka organizaĵo, aliĝinta al UEA, ILEF starigas al si iujn perspektivajn taskojn por atingi kiel eble plej vastskale la disvastigon de Esperanto en la tuta mondo.

ILEF estas politike neŭtrala organizaĵo, kies plej gravaj taskoj estas:

a) unuigi kaj prizorgi la laboron de ĉiuj landaj tiuspecaj organizaĵoj kaj de unuopuloj-amatoroj en la kampo de fotado, filmfarado, kaj surbendigo per magnetofonaj bendoj;

b) instigi la krean laboron de siaj membroj kaj faciligi iliajn interrilatojn kaj (laŭbezone) helpi ilin pri provizado de necesaj foto-kino-magnetofon-materialoj;

c) organizi regule foto-ekspoziciojn kaj konkursojn, kinofestivaletojn kaj renkontiĝojn de siaj membroj en internacia aŭ en regiona skaloj;

ĉ) kunlabori kun ceteraj esperantaj kaj neesperantaj organizaĵoj sur tiu kampo kaj efektivigi ŝanĝon de sperto;

d) eldonadi instrucirkulerojn, informajn materialojn, aliajn fakajn materialojn kaj dissendi ilin al la membroj de la organizaĵo kaj al aliaj E-organizaĵoj, kiuj montrus interesiĝon al la aktivado de ILEF;

e) per siaj aranĝoj propagandi Esperanton inter neesperantistaj medioj kaj interesigi ilin pri la Internacia Lingvo kaj ties reala utilo.

Membro de ILEF povas esti ĉiu scipovanta aŭ lernanta Esperanton, se klopodas disvastigi tiun lingvon kaj se aktive okupiĝas per unu el la supre menciitaj aktivecoj. Oni povas aliĝi pere de la landa organizaĵo aŭ sendinte aliĝilon rekte al la prezidanto de la Ligo kune kun bankĉeko

kun la difinita enir-kaj-jarkotizo de 4 (kvar usonaj dolaroj aŭ egalvalore en nacia valuto).

La ligano devas agi konforme al la Statuto, senĉese perfektigi sian lingvoscion, disvastigi Esperanton altiri novajn anojn kaj regule pagadi la jarkotizon.

Ĉiu membro de ILEF, ordiginta sian membrecon, ricevas specialan membro-karton kun la insiqno de la Liqo.

La organiza strukturo de ILEF estas jena: a) jarkonferenco dum la Universalaj E-kongresoj aŭ en loko, difinita de la estraro; b) Liga Estraro: prezidanto, organiza sekretario-kasisto, sekciestroj de foto, kino kaj magnetofon-sekcioj, la redaktoro de la liga organo (aŭ respondeculo pri la propagandaj aferoj de ILEF).

La sekcioj agas konforme al la Statuto, sed ĉiu aparta sekcio ellaboras sian propran laborplanon —laŭ la specifaj taskoj kaj planitaj aranĝoj.

Ĉiu membro de ILEF rajtas elekti kaj esti elektita en la liga estraro.

En multaj landoj ankoraŭ ne ekzistas specialaj landaj fakaj E-organizaĵoj de foto-kino-magnetofon-amatoroj kaj pro tio grava devo de ĉiu opa membro de ILEF estas klopodi pri la starigo de simila organizaĵo aŭ klubo, kiu aliĝu al ILEF kaj agi celkonforme al la taskoj de la Ligo.

Pliajn informojn petu al S-ro José F. Arroyo.
Avda. Llano Castellano, 11. MADRID-34.

## SOCIOS PROTECTORES 1982

| | | |
|---|---|---|
| 8. | Antonio Corral ... | Nº 2536 |
| 9. | Ramón Diago .... | Nº 2150 |
| 10. | Rafael Herrero ... | Nº 108 |
| 11. | M.ª del Carmen Herrero ......... | Nº 1218 |
| 12. | Pilar García ..... | Nº 498 |
| 13. | Ignacio Macías .. | Nº 2591 |
| 14. | Antonio Gil Contreras ........... | Nº 369 |
| 15. | Rafael Blanes ... | Nº 2561 |
| 16. | Agustín Blasco .. | Nº 2470 |
| 17. | Miguel Termes .. | Nº 2510 |
| 18. | María Pi Cuchi .. | Nº 2197 |
| 19. | José Cerezo ..... | Nº 1944 |
| 20. | Grupo E. de Bilbao | Nº 849 |
| 21. | José Lerroux .... | Nº 373 |
| 22. | Eduardo Larrouy . | Nº 44 |
| 23. | José M.º Linares | Nº 2609 |

## DONATIVOS 1982

| | | |
|---|---|---|
| Suma anterior ...... | 1500 | pts. |
| Luis Martín Herrero . | 250 | " |
| Antonia Galvany .... | 250 | " |
| Pepita Gallart ....... | 500 | " |
| Giordano Moya ..... | 250 | " |
| Agustín Blasco ..... | 100 | " |
| José Ma. Claramunt | 50 | " |
| María Pi Cuchi ..... | 1000 | " |
| Cecilia Gutiérrez .... | 100 | " |
| Tomás Apraiz ....... | 100 | " |
| Suma y sigue ...... | 4100 | " |

### NUEVO DUMVIVA MEMBRO

Antonio Gamboa Sánchez Nº 1576

# FACILAJ TEKSTOJ POR LA KLASO

—ino
virino
—ido
katido
—ulo
blondulo
—isto
vendisto
—ano
parizano
—estro
ŝipestro
-----
—aro
ŝafaro
—ero
fajrero
—ejo
vendejo
—ujo
sukerujo
pirujo
Grekujo
—ema
kredema
—io
Japanio
—eble
neeble
—umi
Somerumi
-----
—eto
ŝipeto
—ego
hundego
—aĉo
domaĉo
—inda
aminda
-----
—eco
beleco
—aĵo
trinkaĵo
-----
—adi
pafadi
—igi
klarigi
—iĝi
klariĝi
-----

## ĈU VI AMAS NUBOJN?

(Klin - klong)
—Ĉu?
—Bonan tagon, sinjorino. Karlo, Karleto por la amikoj. Mi estas vendisto.
—Dankon, mi bezonas nenion, sinjoro.
-Oh, sendube vi havas ilojn de ĉiuj klasoj por la hejmaj laboroj. Tiajn aĵojn mi ne vendas, sinjorino. Mi vendas nubojn. Ili estas normalaj, aŭ etaj, aŭ egaj...
—Mi ne bone komprenas, sinjoro. Ĉu vi vendas nubojn? Nubojn grandajn, malgrandajn aŭ normalajn?
—Certe, sinjorino. Tion mi diras. Nubojn, nubetojn kaj nubegojn. Ĉu... mi povas eniri kaj min sidi?
—Eniru, sinjoro... Karlo?
—Jes. Karleto por la amikoj.
—Sidiĝu, mi petas, sinjoro.
—Dankon, sinjorino. Oh, mi ne plu estas juna, kaj mi estas laca, lacega... Vidu, do. Jen estas miaj nuboj, en tiuj-ĉi skatoletoj. Mi mem fabrikas ilin. Jen la verdaj, la ruĝaj, la bluaj, la grizaj, la flavaj, la blankaj... Por ĉiu momento de la tago. Por la mateniĝo, por la tagmezo, por la vesperiĝo... Oh, sinjorino, miaj nubetoj por la vesperiĝo! Ili estas flamruĝaj, longaj, brilaj, kun plej etaj nuancoj skarlataj, rozaj, purpuraj... Ĉu vi ne volus aĉeti tiajn belaĵojn, sinjorino? Ili estas ege malkaraj.
—Mi multe ŝatas nubojn. Tamen...
—Oh, aĉetu ilin, sinjorino. Ili utilas ĉie; en la kampo, sur la plaĝo, en la hejmo... Vi malfermas la skatolon kaj la nubo eliras, ascendas, etendiĝas... Hejme, se vi estas malgaja, vi povas ellasi nubeton kaj baldaŭ vi sentas vin trankvila, feliĉa... Via tuta familio, geavoj, gefiloj, gefratoj, eĉ la plej antipatiaj bofratoj kaj bofratinoj, ĉiuj ĝuos kontemplante miajn belegajn nubojn. La beleco de miaj nuboj estas laŭdata de mia tuta selekta klientaro. Ili posedas mirindajn ecojn. Mi garantias, ke vi restos ege kontenta de via aĉeto.
—Mi ja ŝatus posedi viajn nubojn, sed...
—Ĉu via edzo..? Sinjorino, mi havas riĉegan sperton pri edzoj. Sendube via edzo multe amas vin, ĉar vi estas ŝatinda virino. Do, li nepre amos miajn nubojn. Aŭskultu min, kaj estu certa pri tio, sinjorino: Edzoj, kiuj ne amas nubojn, ankaŭ ne amas siajn edzinojn. Aĉetu, sinjorino!

.................................................................

—Uf, karulino, mi alvenas preskaŭ morta. Kia nigra tago! Aro da azenoj venis hodiaŭ al mi oficejo. Komercistoj, fabrikistoj, advokatoj, doktoroj, inĝenieroj...

ge—
gefiloj
bo—
bopatro
mal—
malbela
eks—
eksĉefo
ek—
ekplori
-----
for—
forĵeti
en—
eniri
el—
eliri
re—
redoni
-----
lia
sia
ŝia
ilia
-----
blanka
nigra
ruĝa
blua
verda
flava
griza
blonda
bruna
-----
sendube
bone
certe
hejme/n
dum
multe
kompreneble
nepre
tamen
nature
do
-----
aĉulo
ulaĉo
ilaro
-----
ventmuelilo
tagmezo
pruntedono
hejmtasko
labortago
dormoĉambro
animstato

—Kion ili deziris?

—Monon. Mi okupas la plej malagrablan postenon en la Banko. Mia estro, la ĉefo de la Pruntedona Sekcio, sendas ĉiujn petantojn al mi. Kaj dum mi plenumas mian devon, li dormetas en sia ejo. Tiu ulo mortigos min. Porkaĉo! Nu! Kiom da skatoloj kaj skatoletoj! Ĉu vi aĉetis ilin? Kion ili enhavas?

—Nubojn, nubetojn kaj nubegojn, karulo.

—Edzineto mia, klarigu tion. Mia kapo iomete doloras.

—Aŭskultu. Venis tre stranga vendisto, kiu nomiĝas Karlo, Karleto por la amikoj. Li fabrikas kaj vendas nubojn, mirindajn nubojn. Ĉiukolorajn, ĉiuformajn, por ĉiuj momentoj kaj animstatoj.

-Ja, ja, ja. Mi komprenas. Ĉu vi pagis multe?

—Nur tri mil pesetojn, karulo. La vendisto estis vireto maljuna, lacega, kaj... kaj mi sentis kompaton pri li.

—Tri mil pesetojn! Vi pagis trimil pesetojn! Mi laboregas kiel sklavo en mia aĉa oficejo dum la tuta tago, mi iras tien kaj reen en malnova aŭtaĉo... kaj dume mia kompatema edzino forjetas tri mil pesetojn aĉetante tiujn ridindajn skatolojn.

—Sed, karulo, ĉu vi ne amas nubojn?

—Nubojn? Mi ne posedas kamparon nek ŝafarojn. Do, mi ne bezonas nubojn. Tiu ulo trompis vin! Nu! Kial vi ploras nun? Eĉ eron da bona senco vi ne montris. Aĉeti nubojn! Kia negoco! Malfermu la ujojn! Vi vidos ke ili estas malplenaj. Tiu malbenita Karleto estas nur trompisto. Ne ploru, ne... Ĉu la ruzaĵo ne estas klara?

—Oh, mi ne ploris, Naivulo... Mi nur ploretis, ĉar... ĉar... ĉu vere vi ne amas nubojn?

—Bone, bone... Karulineto... Ne ploru, Pardonu min... Mi estas azenego.

—Jen, trinku vian kafon, karulo.

—Dankon. Vi estas edzino admirinda. Nur okazas, ke vi estas tro kredema. Tiu ulaĉo trompis vin. Aĉeti nubojn! Tio estas ideo por revulinoj.

—Ĉu vi amas nubojn, Naivulo?

—Mi amas vin, kaj tio sufiĉas, ĉu ne?

—Diru. Ĉu vi amas nubojn?

—Mmmm. Lasu min reveni al la infaneco, karulino. Kiam mi estis dekdu jarulo, mi kutimis kuŝadi sub pirujo, en la ĝardeneto de miaj gepatroj. Kaj tie mi rigardadis la nubojn... Kia plezuro! La nuboj marŝadis super mi, alte aŭ malalte, lantaj kaj sinjorecaj. Iliaj koloroj, formoj kaj aspektoj fariĝis ĉiam diversaj. La suno leviĝis el la verdaj montoj kaj kuŝiĝis post la blua maro. Ĝi iluminis la nubojn, kaj la nuboj akiris mirindajn formojn. En ili mi vidis brutarojn, kaj nete distingis ŝafinojn kun ŝafidetoj, kiuj kuradis post siaj patrinoj. Tie aperis ankaŭ imponaj preĝejoj, katedraloj, montaroj, arboj kiuj similis al pomujoj aŭ rozujetoj. Kelkfoje mi vidis mian kuzinon Marta kan sian blondan hararon. Aliaj nuboj ŝajnis malproksimaj landoj: Japanujo, Italio, Belgujo, Svedio, Danlando...

—Daŭrigu, karulo. Ĉu vi amas nubojn?

—Mi ankaŭ vidis homojn. Nia urbestro, la vilaĝa kuracisto, kamparanoj, vendistinoj...

—Ektrinku vian kafon, aŭ ĝi malvarmiĝos. Ĉu vi amas nubojn?
—Aliaj nuboj estis kvazaŭ laboriloj. Gigantaj remiloj, ventmueliloj kun longaj brakoj...
—Nu, karinjo. Vi amas nubojn?
—Ami nubojn...? Kompreneble, karulino, sen plej eta dubo. Mi ŝatas nubojn, mi amas la mirindajn nubojn. Kiu, havante koron, povus ne ami nubojn?
—Karulo, kisu min. Forte, forte, forte...
—Sed, kial vi ploras kaj ridas samtempe, amatino?
—Kisu min!
—Kiseton!
—Kiseton!
Muá.
Muá.

**JES**

# RECENZOJ

ENKONDUKO EN LA KULTURON. Eldonis: Portugala Eldono Rondo. Rua Anselmo Braancamp, 259.—4000 PORTO (Portugalio).

GRANDA INSTRUISTO DE LA NACIOJ. La vivo kaj laboro de Jan Amos Komensky (Comenius). Mimeografio. Prezo 7 internaciaj respondkuponoj. Originale verkita en Esperanto de H. K. Bonska. 47 paĝoj. La multaj virtoj de tiu granda homo reliefiĝis en la verko. Li estis persekutita de la sorto, kaj de la homoj, devigata vivi for de sia patrolando, kaj tamen li estis pioniro de la moderna pedagogio, filozofo, poeto, lingvisto (li laboris pri universala lingvo), pacifisto kaj politikisto. Vere meritas koni la vivon de tiu granda homo de la 17.ª jarcento.

VIVO DE ALEXANDRE HERCULANO. Verkis prof. Agostinho da Silva. Tradukis Manuel de Freitas. Prezo 2 int,. rpk inkluzive afranko. Temas pri la vivo de Herculano, fama portugala verkisto kaj politikisto de la pasinta jarcento. Li verkis inter aliaj, romanon «Monaho el Cister» kaj «Eŭriko» kaj historion pri Portugalio kaj la Portugala Inkvizicio.

LA LERNEJOJ DE WINNETKA. Verkis prof. A. da Silva, Tr. M. Freitas Tre interesa verko pri «la moderna lernejo» klariganta la novajn edukmetodojn kiuj permesas veran edukadon kaj instruadon kondukantaj la lernantojn en libereco, ne teorie, sed praktike.

LA VOJAĜOJ DE KOLUMBO. Samaj aŭtoro, tradukisto kaj prezo. Malgraŭ esti tre konataj la vojaĝojn de Kolumbo, en tiu ĉi tiu verko oni rakontas vigle ne tre konatajn okazaĵojn kaj la legado de la klara kaj bonstila esperanto de Sro. Freitas faras pli interesa kaj agrabla ĝin.

LA STOIKISMO. Samaj aŭtoro, tradukisto kaj prezo.
Temas pri la stoikismo, filozofa doktrino aperinta en Ateno dum la 3.ª jarcento a.K. Laŭ la stoikuloj, kiuj deziras esti morala devas antaŭ ĉio agi morale. La stoikuloj estas mondcivitanoj, ĉiu homo estas lia frato, la mondo lia patrujo. Por ili la urbeca kaj naciecaj ideoj estas malgrandanimaj konceptoj, kiujn la inteligento kaj la moralsento devas superi.

**JOHANO**

# INTERNACIA SPORTA SIMPOZIO

De la 8-a ĝis la 10-a de Julio, kaj sub la Honora Prezidanteco de L.R. M. Juan Carlos I-a, okazis en Madrid la Internacia Sporta Simpozio pri «La Sporto en la Moderna Socio».

La 8-an de Julio, en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo okazis la disdonado de dokumentoj, bonvenigante ĉiujn per abunda lunĉo.

La 9-an, je la 10-a matene kaj en Salono de la Altlernejo pri Minoj estis inaugurata la Simpozio prezentante unue la raportojn pri «Sporto kaj Medicino» de D-ro Denoel (Belgio) kaj de D-ro Tortel (Francio), kiuj, pro neĉeesto de la aŭtoroj, estis legataj de Juan Carlos Ruiz kaj Miguel Angel Sancho. Sekve, S-ro Luigi Tola (Italio) prelegis pri «Sporto kaj la Handikapuloj», daŭrigante tre interesan interparolon pri la traktita temo. Post kafo-paŭzo, D-rino M. R. Urueña (Hispanio) prelegis pri «La Sporto en la Juro», tre interesa temo kiu altiris la atenton de la ĉeestaro kiu je la fino faris al ŝi plurajn demandojn. Fine, oni projekciis sportajn filmojn kaj S-ro Juan Carlos Ruiz montris artefaritan minejon.

Nokte, la seminarianoj ĉeestis teatran prezentadon: «La Morto de Garcia Lorca» en la Nacia Teatro María Guerrero.

La 10-an, sabate, daŭrigis la simpozion per prelego de Mag. Dobrzynski (Pollando) pri «Sporto kaj Gazetaro» kaj per prelego de D-ro Polerani (Italio) pri «La Lingva Problemo en la Sporto». Ambaŭ, ege interesaj, kaj kvankam pri malsimila temo provokis amason da demandoj. Post projekcio de sporta filmo, oni komune tagmanĝis je tre malalta prezo kaj p.m. venis la momenton de la diskuto pri la finaj rezolucioj.

Vespere, post gustumi «queimada» en la sidejo de M.E.L., la seminarianoj partoprenis en popola madrida spektaklo en «La Corrala» kiu ege amuzigis ĉiujn.

Kelkaj «kuraĝaj» samideanoj vizitis, malgraŭ la ege terura varmeco, Chinchón kaj Toledo.

Estis por mi ege agrabla surprizo vidi inter la ĉeestantoj, mian israelan amikon M. Braha kaj aliajn hispanajn samideanojn, same kiel konatiĝi kun tiel elstaraj samideanoj kies prelegoj ege interesis nin.

Notinde estas ke la «Consejo Superior de Deportes» eldonis libron enhavanta la diversajn prelegojn kaj kvar lingva sporta Terminaro.

La Seminario kiu okazis sub la aŭspicio de Hispana Esperanto-Federacio estis vere sukcesa kaj pro ĝia organizado, meritas gratulojn la organizantoj.

**L. HERNANDEZ**



## FORPASIS SAMIDEANO PEDRO MARQUETA

Ni bedaŭras la perdon de unu el la plej elstaraj hispanaj esperantistoj: Pedro Marqueta Roy forpasis pro subita koratako la 16an de Aprilo 1982.

Kiel esperantisto ĝis la medolo, li profunde sentis la idealisman sencon de tiu pasinta epoko de la interna ideo kaj komprenis la modernan praktikon de la nuna momento kiujn li saĝe kombinis kaj praktike realiĝis en la ĉiutaga por-Esperanta aktivado.

Tre juna ankoraŭ, li estis kaptita de la sorĉo de la Zamenhofaj ideoj, lernis la lingvon kaj arde aktivis kiel tia kun la junaj boj-skoltoj de Zaragoza.

En la jaro 1933 li partoprenis en hungara jamboreo kie konis lian korespondantinon el Estonio kiu post ne longe estis lia edzino. Kiel la juna paro absolute ne konis la respektivajn lingvojn, Esperanto estis por ili ne nur le ideala lingvo kiun ili ambaŭ revis, sed fakte kaj devige, la nura intima kaj ordinara lingvo de ties hejmo.

Pedro Marqueta ne nur estis entuziasma esperantisto sed tre kompetenta kaj kapabla: li parolis, skribis kaj regis la lingvon vere majstre. Kiel Prezidanto de la O.K.K. en la jaro 1954, li organizis la XVan Nacian Kongreson en Zaragoza, kiu, laŭ kompetentaj elsteraj samideanoj kiuj partoprenis ĝin, estis modelo pri organizo kaj inteligenta laboro.

Dum multenombraj jaroj li estis, estrarano unue kaj poste Prezidanto de «Frateco» partoprenis en multaj internaciaj Kongresoj kaj posedis bonegajn amikojn en la tuta mondo. Liaj prelegoj en nia Centro okaze de niaj Seminarioj dum ĉi lastaj jaroj estis vera ĝuo por ni ĉiuj.

Kelkaj tagoj antaŭ lia forpaso, li estis unuanime elektita de la Zaragoza esperantistaro por prezidi la O.K.K. kiu devas prepari la 75an Jubilean datrevenon de «Frateco» kaj la 43an Kongreson de Hispana Esperanto-Federacio kiu okazos en Zaragoza dum somero de 1983.

Kun samideano Pedro Marqueta, ni perdas, efikan kaj inteligentan kunlaboranton, bonan kaj ĝisfunde honestan homon, kaj la mondo, unu el tiuj sindonemaj kaj puraj idealistoj kiun la homaro senĉese necesas.

Ke li pace ripozu, kaj tutkoran kondolencon por lia familio, kiun ni alte estimas.

**SEKRETARIO DE «FRATECO»**

# DEZIRAS KORESPONDI

Kun hispanaj geesperantistoj, 39 jaraĝa instruisto de Elementa Lernejo; li kolektas b.k., prospektojn, turismajn mapojn kaj cetere. S-ro Dizdareviĉ Josuf; Arnauti 12; 72207 PUHOVAC (Jugoslavio).

23 jaraĝa hungara laboristo kaj studento kun samaĝaj gejunuloj pri diversaj temoj: S-ro Csákvári Gábor; Ötvözetgyár u. 6; 3141 SALGOTARJAN (Hungario).

Pri natura medicino, akupunturo, medicina flaŭro, k.t.p. S-ro Fernando Emilio Ferraz Santos; Av. Independencia 1625/ 702 A. JUIZ DE FORA - MG (Brazilo).

Kun gehispanoj pri ĉiu temo Inĝ. Jeray Michalski; ul. Pocatowa 9; 26-660 JEDLINSK (POLLANDO).

Kun hispaninoj, pri filmoj, teatro, muziko, kaj literaturo, F-ino Vagó Bolya; Tánscics M.U. 158; 5053 SZASZBEREK (Hungario).

Kun hispanoj por interŝanĝo de p.m. S-ro Vladimir Pys; 723 00 MARTINOV c. 13 OSTRAVA (Ĉehoslovakio).

27-jara bulgara krupiero deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Interesoj: aŭtoturismo, muziko, sporto. Respondo certa. Adreso: Laĉezar Josifov Georgiev, poste restante, BG-1000 SOFIA, Bulgario.

50 bulgaraj gelernantoj (14-17 jaraĝaj) deziras korespondi kun hispanaj geamikoj. Adreso: Gimnazio «9a de Septembro» (Esperanto), 5180 Polski Trambeŝ, BULGARIO.

Emerita inĝeniero ŝerĉas korespondantojn pri Paco, E-glumarkoj kaj insignoj. Respondon certigas Viktoras Baniulaitis, ab. d. 168, SU-235800 Klaipéda, Litovio (SSR) Sovetunio.

Kiu povos helpi min kompletigi miajn kolektojn de Esperantorevuoj, inter ili LA SUNO HISPANA, TUTMONDA ESPERO, KATALUNA ESPERANTISTO, k.t.p., pere de vendo aŭ interŝanĝo de la mankantaj numeroj? S-ro. Ramón Molera - str. Sta. Joaquina, 13 - Moia (Barcelono) - Hispanio.

# NOTA DE TESORERIA

Se recuerda a todos los federados que aún no han hecho efectiva la cuota correspondiente al año actual, que el próximo número de BOLETIN les será enviado contra reembolso, por lo que, para evitar molestias y trabajo innecesario, rogamos se pongan al corriente a la mayor brevedad. Gracias anticipadas por su colaboración.

INTERKOMPUTO

BUDAPEST 1982

# INTERKOMPUTO-82

## Internacia Komputo-scienca Simpozio

La Komputo-scienca Societo «Johano Neumann» **NJSZT** organizos Internacian Komputo-sciencan Simpozion **INTER-KOMPUTO-82** sub aŭspicio de la Scienca Kaj Eldona Centro de UEA. Ĝi okazos en Budapeŝto (Hungario) inter la 27-a de decembro kaj 2-a de januaro 1983.

INTERKOMPUTO-82 estos prezidata de akademiano Tibor Vamos, prezidanto de Internacia Aŭtomatiga Asocio IFAC kaj de NJSZT. La Organiza Komisiono estos prezidata de Prof. D-ro Ottó Haszpra, gvidanto de Scienca kaj Eldona Centro de UEA.

INTERKOMPUTO-82 demonstracios la teoriajn baz-esplorojn pri komputo-scienco kaj la praktikan aplikadon de la komputo-tekniko por helpi la internacian fakan komunikadon.

Temaro: Teoriaj bazoj de komputo-scienco /program-analizado kaj sintezado, teorio pri datum-strukturoj, mal-simpleco de programoj, formalaj lingvoj, aŭtomato-teorio/. Kibernetiko / artefarita inteligento, per-kaj pri-komputila instruado, robotoj ktp./. Programadaj sistemoj /programlingvoj, operaciaj sistemoj, distribuitaj sistemoj, programado laŭ ne-Neumann-aj principoj, metodologio de programado, komfortaj komputo-sistemoj/. Teksto-prilaborado per komputilo /tekstaj datumbazoj, bibliografiaj inform-retrovaj programoj, perkomputila tradukado, voĉaj enigo kaj eligo/.

Aplikoj /por tekniko, scienco kaj datumprilaboro/.

Ekspozicio /konigoj, demonstracioj/.

La Komputo-scienca Societo «Johano Neumann» fondiĝis en 1975, kiel memstara membro-organizo de la Asocio de Teknikaj kaj Naturscienca Societoj.